

# Vizitinda allogaĵo apud ĉefurbo de Ĉeĥio

/Enkonduko/

Ĉi-somere vojaĝante kune kun Markéta tra Ĉeĥio mi vizitis belegan kastelon Karlštejn apud Prago troviĝantan ĉirkaŭ 30km for de la ĉefurbo (nur duontage per ĉevalo).



Karolo la 4a (1316 - 1378), reĝo de Ĉeĥio kaj reganto de Sankta Roma Imperio /alivorte: ĉeĥa reĝo kaj roma imperiestro/, kies 700an naskiĝdatrevenon oni ĵus festas, enskribiĝis en historio speciale kaj durable per siaj enterprenoj de fondado de la Universitato de Prago kaj praga kvartalo Nova Urbo kaj antaŭ ĉio per konstruado de kastelo Karlštejn en 1348 jaro en iama urbeto de metiistoj nomata Budňany. Nomo Karlštejn signifas "ŝtono de Karolo" verŝajne pro la fakto, ke la kastelo de la reĝo kaj la posta imperiestro estis konstruita sur granda roko.

/Priskribo de la kastelo/



Monumenta kaj bela kastelo, trezoro de reĝaj kaj imperiestraj insignioj, relikvoj de sanktuloj kaj aliaj valoraĵoj, centroo de artaj metiejoj - ĉio tio estis simbolo de ŝtata potenco.

Ĉefaj konstruaĵoj de la kastelo estas jenaj: alta Granda Turo kun reĝa kapelo de sankta Kruco, Meza Turo de sankta Maria kun kolegiata preĝejo de Virgulino Maria kaj Imperiestra Palaco. Sube de la palaco situas malsupra kastelo kun granda korto kaj sidejo de Burggrafoj al kiu gvidas vojo inter pordegoj. Plej malsupre troviĝas Turo de puto en kiu funkciis granda ligna rado por elpreni sitelon, kiun movigadis du homoj promenantaj en ĝi.

Plej granda fieraĵo de la kastelo estas kapelo de sankta Kruco kiu situas je dua etaĝo de Granda Turo. Ĝi havas krucan volbon kaj meze de ĝi troviĝas misterie

dekorita glidita krado malantaŭ kiu troviĝis antaŭaltaro al kiuj nur episkopoj rajtis eniri. Onidire Karolo la 4a pro estimo al la loko ĉiam antaŭ eniro al la kapelo deprenis siajn ŝuojn enirante tien nudpiede. Riĉe dekorita plafono de la kapelo prezentas ĉielan firmamenton kun kelkdek da steloj, luno kaj suno. Muroj estas dekoritaj de valoraj ŝtonoj kiuj formas krucojn. Videblas heraldikaj ĉeftemoj de ĉeĥa leono, imperiestra aglo kaj inicjalo „K”. Supre ĝis plafono troviĝas unika en la mondo kolekto de 129 bildoj de tabla pentrarto de ateliero de Majstro Theodoriko, kortega pentristo de la reganto. Tiu vasta kolekto de gotika pentrarto prezentas la apostolojn, sanktulojn, papojn, episkopojn, reĝojn, kavalirojn, sanktulinojn – ĉiuj konsistigantaj armeon gardantan juvelojn stokitajn en la kapelo i.a. reĝajn insignojn. Super niĉo en la mezo de la altara sceno troviĝas triptiko pentrita de Tommaso de Modena, kiu prezentas Madonon kun infaneto, sanktan Venceslaon kaj sanktan Palmatiuson. En la kapelo la reganto lokigis mezepokan trezoron – kolekton de relikvoj devenantaj el diversaj partoj de la mondo. En fenestra alkovo de la kapelo rigardindas surmura pentraĵo „Adorado de la Magoj”, inter kiuj la tria karaktero similas al reĝo Karolo la kvara.



Ĉe teretaĝo de la Imperiestra Palaco videblas grandegaj arkadoj. Ĉambroj je unua etaĝo estis uzataj de korteganoj de Karolo, duan etaĝon uzadis la imperiestro por privataj kaj reprezentaj celoj (privata ĉambro de Karolo, Aŭdiencia Halo, Halo de Antaŭuloj kaj Festena Halo nomata ankaŭ Ĉambro de Gastoj). Tria etaĝo apartenis al reĝino kaj sia akompanantaro /grupo de personoj solene akompananta ŝin/.

Ĉefa Reprezenta Ĉambro - Halo de Antaŭuloj - estis dekorita de surmuraj bildoj, kiuj montras verajn kaj fikciajn antaŭulojn de Karolo la 4a. Genealogia arbo sur muroj de la salo estis pentrita antaŭ ĉio por pruvi rajton de Karolo la 4a fariĝi imperiestro. Laŭ mezepoka imago nur posteuloj de malnovaj monarĥiaj familiaj domoj havis rajton fariĝi imperiestro kaj plej malnova deveno estis prestiĝa afero. Do Karolo la 4a prezentis siajn antaŭulojn komencante de bibliaj karakteroj inkl. Noa, tra romiaj imperiestroj, eŭropeaj reĝoj - antaŭ ĉio kun Karolo la Granda - finante je membroj de dinastio de Luksemburgo. Je supro (ĉefa parto) de la genealogia arbo estis Johano de Luksemburgo kaj Elizabeto de Bohemio, gepatroj de Karolo kaj je fino estis mem Karolo la 4a kun siaj edzinoj.



### **/Edzinoj de la imperiestro inkl. du polaj/**

Karolo la kvara de Luksemburgo (havanta bapton nomon Venceslao - čeňe Vaclav) ne estis entuziasma batalanto kaj komandanto de soldatoj. Por pligrandigi sian reĝlandon li elektis alian metodon nome geedziĝan politikon. Li havis kvar edzinojn, kompreneble ne samtempe sed unu post la alia. Al la unua profunde enamiĝita Blanche de Valois (1316 – 1348) edziniĝis en 1329 en Parizo. Tamen ili ne havis infanojn ĉar ŝi bedaŭrinde mortis june pro tuberkulozo. Poste en la jaro 1349 li geedziĝis en Bachary kun Anna de Palatinat - Wittelsbach (1329 - 1353) sed post 4 jaroj ŝi ankaŭ mortis. Oni diras, ke Karolo la kvara eniris tiun geedzecon pro pure politikaj kialoj por sigeli interkonsenton kun la domo de Wittelsbach. Poste 14-jaraĝa pola princino Anna de Świdnica (1339 - 1362) fariĝis lia edzino en 1353 jaro (nupto en Budíně). Onidire ŝi estis plej bela virino en la mondo tiutempe. Ŝi naskigis al li filon Vaclav - heredanton al la trono. Bedaŭrinde ŝi mortis estinte nur 23 jaraĝa dum naskiĝo de ilia tria infano. Lasta geedziĝo okazis en 1363 en Krakovo kun Elizabeto de Pomerio (1347 – 1393), kun kiu Karolo la kvara havis 6 infanojn. Ŝi estis pli forta ol antaŭaj edzinoj kaj pluvivis ol li kio eblas facile kompreni ĉar kiam ili geedziĝis li estis 47 jaraĝa kaj ŝi estis nur 16 jaraĝa.



### **/Kaŝita akcidento de imperiestro/**

Kvankam oni malpermesis al la reganto de la imperio (pro lia granda respondeco) partopreni en turniroj de kavaliroj li faris tion kaŝe kaj bedaŭrinde unufoje estis serioze vundita (trafita per ligna lanco al mentono, makzelo kaj spino, kio kaŭzis paralizon) kaj poste li longe ne aperis publike. Tuta afero estis kompreneble kaŝita. Je feliĉo danke al italaj kuracistoj post 9 monatoj li saniĝis sed jam ĝis fino de sia vivo (ankoraŭ 27 belaj jaroj!) li havis ĝibon kaj portis barbon por ke oni ne vidu cikatrojn sur lia vizaĝo. Imperiestro certe multon lernis de tiu leciono.

### **/Historiaj faktoj pri la kastelo/**

Sciindas kelkaj datoj (faktoj) pri historio de la kastelo. Fondita en 1348 ĝi estis finkonstruita en 1357. En la jaro 1422 ĝi sukcese resists atakon de Husitoj, kiu daŭris duonjaron. Incendio en 1487 estis unu el kaŭzoj de malfrugotika rekonstruo, precipe pligrandigo de la palaco de Burggrafoj ĉe la turno de 15a kaj 16a jarcento. Je fino de 15a jarcento oni konstruis kvarbrakan ŝtonan - ĝis nun uzatan - ŝtuparon meze de norda fasado de la imperiestra palaco, kiu kombinis (interkonektis) etaĝojn de la palaco. Rimarkebla ŝanĝo okazis dum reĝado de la imperiestro Rudolf la Dua: dum la jaroj 1578-98 kiam gvide de reĝa konstruisto Ulric Aostalli da

Salla okazis signifa renesanca konstruo. Konstruaĵoj kaj muroj estis ornamitaj de letertipa sgrafiarto. La kastelo gajnis subtilan silueton kaj unikan belecon. En 1619 juveloj de ĉeĥa kronado estis prenataj el la kastelo kaj tiam ĝi perdis sian ŝtatan signifon. Spite de malgrandaj alĝustigoj la kastelo en ĝia gotika-renesanca aspekto estis falanta en kadukiĝon ĝis la unua duono de la 19a jarcento, kiam ondo de romantikismo levigis intereson pri la mezepoko. Komence de 19a jarcento post la vizito de imperiestro Francisko la Unua oni faris la plejn urĝajn riparojn, kiujn estris burggrafo A.Libštejnský el Kolovraty. La nuna aspekto estas rezulto de purisma novgotika konstruo de arkitekto J.Mocker en la jaroj 1887-1899.



### **/Finaj vortoj/**

Resumante se vi planas viziti Pragon nepre venu ankaŭ al troviĝanta apude, ĉirkaŭita de bela verdeco, kastelo Karlštejn ĉar ĝi estas vizitinda kaj certe faros al vi bonan impreson.

Adam Wilkus, fine de 2016a jaro